

KULTURO kaj SOCIO de NORDA BAKTRIO (laŭ la plej novaj arkeologiaj malkovroj).

Vladimir I. Ionesov

Dum lastaj du jardekoj en la sudo de Uzbekistano k en norda Afganistano estis faritaj gravaj arkeologiaj malkovroj de la fruurbecaj monumentoj de la II-a miljaro a.K. (Sapallitepa, Ĝarkutan, Bustan, Molali, Daŝli, Farukabad, Tikar, Girdaj, Sortugaj k.a.) k ankau historie postsekvintaj komence de la I-a miljaro a.K. objektoj de la frufera epoko (Tillatepa, Kuĉuktepa, Kyzyltepa, Bandyhan I, Mirŝadi k.a.). Malgrau malsamgrada skalo de ilia arkeologia trastudo, ili ĉiuj havas sciencan valoron por la esplorado de multaj gravaj aspektoj de la fruaj etapoj de urba evoluo de la civilizacio en Meza Oriento. Aparta historia valoro de tiuj ĉi monumentoj estas en tio, ke post la stagniĝo de la fruurbecaj centroj de apudkopetdagaj oazoj (suda Turkmenistano), Horasan (Norda Irano) k Belugistan (Suda Afganistano) dum la unua triono de la II-a miljaro a.K. la zono de la aktiva procedo de urbigo k ŝtata genezo translokiĝis al la Oriento, al la delto de Murgab-rivero k al la fekunda tero de Amudarjo-baseno (Askarov 1977, Kohl 1984).

Suda Uzbekistano estas unu el la plej perspektivaj regionoj en la esplorado de tiu ĉi temo. Sub la gvido de akademiano Ahmadali A. Askarov estas ĉi tie plene elfositaj la vico de grandaj objektoj (Sapallitepa, Ĝarkutan-montetoj 4A, 4B, 5, 6, Bustan 7), k ankau estas malkovrita la serio de la kvalite novaj (por la bronza epoka Meza Asio) fruurbaj kompleksoj – monumenta templo de fajro, citadelo kun la konstruaĵoj de palaca tipo,

produktodonaj masivoj. Ili ĉiuj havas principan signifon en la esplorado de la sociala evoluo de fruklasaj socioj k historiaj kondiĉoj de la ekesto de la fruŝtata ideologio (Askarov, Ŝirinov 1989; Ionesov 1990).

Histori-arkologia trastudo de Ĝarkutan, ties historia topografio, sociala-teritoria strukturo k etapoj de la urba evoluo elokvente atestas pri la aparteno de urboloko k ties evoluo al la fruŝtataj organismoj de la antikva orienta tipo (Askarov 1986; Ionesov 1990).

Sociala-prestiĝa strukturo de la urboloko sendube reflektas la multtavolan hierarkion de sociaj ligoj k rilatoj en la ĝarkutana socio. La tuta ekonomia vivo de ĝarkutananoj baziĝis sur la irigacia terkulturo k apudoma brutbredado. La evoluinta irigacia reto ebligis efike praktiki terkulturan mastrumadon vastigante la semadareojn k altigante la bonrikolton. Ne malpli grava sektoro de grego estis ŝafoj, kaproj, bovoj, bovinoj, porkoj k aliaj hejmbestoj, ebligantaj regule ricevadi sufiĉe grandan idopliiĝon. Estante la bazo de la ekonomia bonhavo de la ĝarkutana komunumo la vico de produktoj de terkulturo k bestbredado fariĝas la objektoj de kulto k adorado (gramenacoj, ŝafoj, kelkaj viandmanĝaĵoj, laktaĵoj, drinkaĵoj ka). En la entombiga rito estis vaste praktikataj la oferdonoj de la sanktaj ŝafoj, en la materia kulturo estis disvastigita planta k zoomorfa simbolaro.


Signifan rolon en la ekonomio okupis ankaŭ metiproduktado k antaŭ ĉio potfarado k metalurgio, kies produktaĵoj favoris la evoluon de komercintersanĝa agado. En Ĝarkutan k ties ĉirkauaĵoj estis konataj kelkaj apartiĝintaj produktodonaj masivoj kun la potencaj ceramikaj fornoj por la amasa produktado de argilvazaro (Rahmanov 1987). La kresko de agrokultura k metia

produktado k ekonomia specialiĝo altigis la kvanton de regula plusprodukto k helpis la evoluon de redistribuaj rilatoj k la transiron de la gvidantaro de la komunumo de la fizika laboro al la administra agado. Ĉi ĉio okazis samtempe kun aktiva vastigo de la socia organismo t.e. kreskanta fortigo de la organizaj-reguligaj funkcioj k elformigo de speciala privilegia gvidantaro senpere ne engaĝita en la materia produktado. Ĉeesto de la konstanta plusprodukto en la socio klare videblas en la monumenta arkitekturo de Ĝarkutan. La materiiginta rivelajo de la institutigo de la potenco en la ĝarkutana socio fariĝis konstruado (proksimume en la XIV-XIII jarcentoj a.K.) de la palaca komplekso k templa ensemblo (Askarov, Ŝirinov 1989; Ŝirinov 1989). Se la unua el ili atestas pri la apero de la reganta aristokratio, pri la profundece de socia tavolo de la komunumo, la multŝtupa hierarkio de socia vivo k politikigo de la potenco k la dua el ili montras la formigon de la idolpastra monopolo je religikulta agado de la komunumo. La palaca komplekso k la templa ensemblo, lau nia vidpunkto, konstatis en la socio la formigon de la socia k respektive ideologia centraligo (Ionesov 1990). Diferencigo de la socia vivo je la nivelo de produktadaj interrilatoj grandparte respondis al la diferencigo de la materia konsumo. Ĉio ĉi favoris la redistribuan movadon de plusprodukto k disvastigon de la sociala-diferenciga kodigo de ritaĵoj. Ties arkeologia pruvo estas la tombejaj eltrovaĵoj de la supropartoj de bronzaj sceprotoj, sigeloj k pli poste ankaŭ de la diversspeca rita ilaro en la formo de miniaturaj bronzaj imitaĵoj de tranĉiloj, hakiloj, ponardoj serpoj, ŝtupetaroj, speguloj ka.) (bildo 1).


Versajne ne hazarde, la disvastigo de la rita entombiga ilaro okazis preskau paralele kun la ekapero de la templo de

fajro en la urboloko. Tie trovitaj metalurgiaj metiejoj ebligas al ni supozi, ke en ili estis farata la rita-kulta ilaro por la entombigaj celoj k, kio pleje gravas, ĝuste la templo verŝajne sankciis la tutan ideologian agadon en la sfero de kulto. Oni ankaŭ povas supozi, ke kun la konstruado de la templo de fajro ĝenerale finiĝis la kunfandigo de malgrandaj dispartigitaj familiaj-gentaj (hejmaj) kultoj en unu tutgentan diaĵon en la formo de la dio de fajro.

Tiamaniere Ĝarkutan en la lasta triono de la II-a miljaro a.K. transformiĝis en la metropolan fruurban centron, kiu plenumis la funkciojn de ekonomia, politika k ideologia avangardo en Norda Baktrio. Pro sia geografia aparteno Ĝarkutan fariĝis la potenca fortikaĵo - katalizilo en la politika genezo k klasformado de antikva baktria socio.



Bildo 1. Miniaturaj ritaj bronzaĵoj de laboriloj el tombejo Ĝarkutan (1200 - 1000 a.K.).



Bildo 2. Komplekso de ritaj artefaktoj el tombo 268 de la tombejo Ĝarkutan 4B (1200 - 1000 a.K.).

Literaturo:

1. Askarov A. A., "Drevnezemledelĉeskaja kultura epohi bronzy juga Uzbekistana", Taŝkent, FAN, 1977, 232 p.
2. Askarov A. A. "Juĝnouzbekistanskij oĉag drevnebaktrijskoj civilizacii", Drevnie civilizacii Vostoka, Taŝkent, FAN, 1986, p. 44-54.
3. Askarov A. A., Ŝirinov T. "Drevnebaktrijskij ĥram ognja v juĝnom Uzbekistane", Gradostroitelstvo i arĥitektura, Kultura Srednego Vostoka, Taŝkent, FAN, 1989, p. 7-24.
4. Ionesov V. I. "Stanovlenie i razvitie ranneklassovyĥ otnoŝenij v osedlozemledelĉeskom obŝestve Severnoj Baktrii", Avtoreferat diss. kand. ist. nauk. Samarkand, 1990, 25 p.
5. Kohl Philip L., "Central Asia Palaeolithic Beginnings to the Iron Age", Paris, 1984, 284 p.
6. Rahmanov U., "Keramiĉeskoje proizvodstvo epohi bronzy juĝnogo Uzbekistana", Avtoreferat diss.kand. ist. nauk. Samarkand, 1987, 18 p.
7. Ŝirinov T., "Ĝarkutan - rannij gorod epohi bronzy juga Uzbekistana", Zony i etapy urbanizacii v Srednej Azii, Taŝkent, 1989, p. 43-44.

Adreso de la aŭtoro:

D-ro Vladimir I. Ionesov, C. Sc.,
 Instituto de Arkeologio de Akademio de Sciencoj de
 Uzbekistano,
 ul. akad. Abdullaeva 3,
 GUS (SU) 703051 Samarkand
 Respubliko Uzbekistano.

INTERAGO de VITAMINO A kaj IMUNOSTIMULILOJ

Nikolaĵ I. Ŝigajev, Natalja A. Mufazalova, Eŭgenij K. Aljoĥin,
 Alfija Ŝ. Bogdanova, Ljudmila A. Rjabĉinskaja

1. Enkonduko

Lastatempe en la tuta mondo kreskas kvanto de alergiaj, aŭtoimunaj, infektaj kaj aliaj malsanoj, kies kuracado inkluzivas samtempan aplikon de imunostimuloj kaj vitaminoj, kiuj mem povas moduli imunon. Tamen interago de la drogoj ne estas sufiĉe plene esplorita problemo. Unu el la plej imunologie aktivaj vitaminoj estas retinolo (vitamino A). Tio instigis nin pli detale studi ĝiajn kombinaĵojn kun imunostimuloj prodigiozane, oksimetacilo kaj taktivino.

2. Vitamino A

Vitamino A estis trovita de E.V. McCollum kaj M. Davis en la jaro 1915. Nun estas konataj kelkaj ĝiaj vitameroj: retinolo, retinalo, retinoacido kaj dehidroretinolo. La plej aktiva el ili estas retinolo, kies acetato kaj palmitato estas uzataj en medicina praktiko.

Biologia rolo de vitamino A estas ligita kun kresko kaj reprodukto, imuno, vidkapablo, diferenciĝo kaj evoluo de epiteliaj histoj. La lasta vitamina funkcio eble dependas de ĝia partopreno (forme de retinilfosfato) en transporto de sakaridoj (fukozo, manozo) por ĉelmembrana glikoproteina sintezo. Retinola derivaĵo retinalo estas vidpigmenta ĥromoforo en ĉiuj animaloj krom kelkaj fiŝoj, kies ĥromoforo estas dehidroretinalo.

En homa organismo retinolo estas sintezata el β -karotino